

1921-07-02-sergeant-fousek_1

Kara samideano.

Grandan dankon por via afabla & interesa letero de la 24a de la pasinta. Mi ĝin estimas des pli bone ke mi ĝin atendas pli longe. (Sed, tamen mi pli ŝatas kiam unu monato ne trapasas antaŭ ol vi skribas). Sed, mi komprenas kiel vi povas esti okupata precipe se ĉiu vespere vi faras muzikon & Esperanton.

Dankon por la artikoloj el via ĵurnalo. Tre interesaj ili estas & la verkinto skribas vere tre bone. Dankon (kiom da dankoj!) ankoraŭ por la vera ĉarma P.K. el Hradec Králové. Mi estis tre tuŝata pri ĝi. Ŝajnas al mi ke mi estas ĉirkaŭata je rondo familia en via lando. Mi jam skribis al 3 personoj sur tiu P.K. = vi, s-ro Berger & Daniel & nome, konas s-inojn Berger & Fousek. Sed, diru al mi, ĉu estas la kutimo en via lando meti al ĉiuj edzinoj „ova“ post la edza nomo? Kial do?

S-ro Daniel sendis foton de Kongreseto en Přelouč 3an Aprilo, same kiel tiu kiun vi sendis al mi & li nomis s-inon Berger, alian ol vi montris. Vi montris ŝin junan s-inon sidantan kun flageto en brakoj. Li montris tiun kiu sidis malantaŭe ŝi

1921-07-02-sergeant-fousek_2

Kiu estas prava?

Ni jam okupiĝis pri pasportoj – oni ne scias tie la adreson de la ambasadore en ĉeĥa en Paris. Do, tio estos pli longa. Pli malfrue, samtage. Nun, ni scias & la letero estas for.

Mi malvarmumis la lastan dimanĉon & tudas multe – malsana mi sentas min kun febro. Ke nenio malhelpu min iri Prahon!!! Ni ĝuis (?) tropikan veteron sabaton & la morgaŭan tagon, malvarmegan veteron. Kiel oni povas sane vivi? Boulogno estas terura urbo por ŝanĝantaj klimatoj. La ventegoj estas kruelaj, iam. Nun, oni bezonas pluvon. Neniam oni vidis similan sekecon. Ĉiu kreskaĵo mortas. La polvo estas grandega. Kaj por pligrandigi ĝin... ekzistas de post 4 tagoj aŭtomobilaj kursoj. Centoj de aŭtomobiloj trapasas antaŭ mia hejmo ĉiutage. Mi volas iri al la plej granda kurso morgaŭ, en la aŭtomobilo de mia frato je la 6-a matene sed mi devos meti almenaŭ 4 mantelojn k. t. p. pro mia tuso, ... ĉar mi volas esti kuracita por ... Praha. Neniam kutime, mi tudas...sed tio estas preskaŭ la „vuflo....“.

Mi ne memoris ke mi rakontis al vi ke mi pezis 60 kilo. Estis eraro, estas nur 58 k. Mi pezis min antaŭ 2 semajnoj. Tio estas ne grava afero. Vi ne pezas tro. Mia edzo antaŭ la milito pezis 97 kilo

1921-07-02-sergeant-fousek_3

post la milito 76 k & nun 86 k.

Li mezuras 1 metro 78 & mi 1,60 (sen ŝuoj).

Jes, certe, misogyne estas franca vorto. Mi esperas ke via edzino bone fartas. Ĉu vi volas danki ŝin pro ŝia subskribo. Tre afabla ŝi estas. Mi esperas ke ŝi atendas post la Kongreso por doni al vi la plej grandan feliĉon & tute permesos al vi veni Prahon.

Certe, Krakovo estas pli malproksime ol Praha. Kaj ankaŭ Zakopane kien ni iris estas ankoraŭ pli malproksime. Ho! Zakopane, kiom da memoroj tiu nomo vekigas en mia penso! Kia bela vojaĝo! Kia bela Kongreso!!!

Sur la P.K. kiun vi tiel afable sendis al mi de Poděbrady staris lignan primitivan veturilon & mi rimarkis al vi ke tiu tipoj de veturiloj ekzistas ankaŭ sur la montoj Tatraj ien mi iris de Zakopane ĝis Morskie Oko. Tie, oni neniam vidas ilin. Jen la kaŭzo de via nekomprene pri „veturiloj“.

Nun ke la momento alproksimiĝas por la Kongreso, imagu ke mi timas ne povi paroli tiel flue kiel mi dezirus....ĉar mi neniam parolas & ankaŭ, ĉar mi estas timema & perdas

1921-07-02-sergeant-fousek_4

pro tio miajn ecojn. Sed post kelkaj tagoj mi estos pli fluema eble!! Vi sendube parolas multe, ofte. Mi pli facile skribas ol mi parolas.

Mi ne komprenas kial ne ekzistos kunveno de juristoj en tiu venonta Kongreso. En antaŭaj ĉiam estis. Vi, advokato, devas aranĝi tion. S-ro Degoad estis sekretario antaŭ la milito.

Mi dankas vin pro via ĝentileco skribi al mi tiele mandante la teatraĵojn. Tie, de post Majo, Kazino estas malfermata & tie oni ludas teatraĵon ĉiu vespere & ankaŭ al Bacarab petits chevaux, roulette, k. t. p. Oni dancas ĉiu vespere, ekstere & malekstere. Mi ne povas iri ĉar mi funebris. Cetere, mi ne tre ŝatas & estas „blaseé“ pri tio. Tamen, la orkestro posttagmeze & vespere estas bonegaj.

Pri la serĉo & „ŝerco“ de loĝejoj estas same en la tuta mondo. Neniu povas trovi. Oni devas aĉeti lignajn „barakojn“ & vivi tiele. Sed ili estas varmaj dum somero & malvarmaj dum vintro. Mi esperas ke vi sukcesos havi la loĝejon por vi.

7h 30 vespere

Jen mi ĵus revenis de la tenisa klubo... mi ludis.

Malgraŭ la kataro k. t. p. & mi ĝuegis tion. Mi bone ludis, gajnis & sentas min multe pli bona. Tiu tenisa klubo estas la plej bela en Francujo & eĉ en Eŭropo pro la ĉirkaŭaĵoj. Estas la antikvaj muregoj de la urbo kiuj

1921-07-02-sergeant-fousek_5

limigas ĝin grandegaj arboj, floroj & valerianoj (violaj) kreskas sur tiuj muregoj. Oni akvumas ĝin preskaŭ la tutan tagon & neniam estas polvo.

Kaj post unu duono da horo la granda batalo Carpentier - Dempsey komencos. Vi ne povas imagi, la grandegan intereson de ĉiuj. Ĉiuj ŝajnas fanatikojn. Eĉ mi mem, kiu tute malaprobas tiujn premiojn grandajn, tiun febron, tiun entuziasmon pro pugna batalo en la tuta mondo, eĉ mi mem, prenas intereson & interesiĝas. Multaj personoj ne kuraĝas por aŭdi la rezulton. Kiel ekzistas 5 horojn de diferenco kun Ameriko & ni, la batalo nur komencas je la 8-a franca horo.

Ĉu ekzistas diferenco inter via horo & nia? Ĉu vi pensas ke la post vojaĝo al la ĉefaj banlokoj & tago sur la Elbo estos interesa? Eble mi jam petis tion de vi. Ni intencas iri mi pensas – ĝi estos organizota de Boŝoj! Dankon por via portreto en uniformo. Vi certe, kiel ĉiu homo, estas pli bela tiele ol en ĉiutagaj vestoj... sed tiu milita kostumo ne estas agrabla al ni Francoj (ne pli agrabla ol ĝi estas al vi mem sendube). Ĝi tro suferigis nin. Kiel la alia estas granda

1921-07-02-sergeant-fousek_6

& maldika. Vi ridetis min dirante speciale = la plej malgranda estas mi. Ĉu vi ne scias ke mi bonege konas vian vizaĝon & aspekton? Mi jam havas 5 fotografaĵojn de vi.

Estas iom timinda afero konatiĝi kun iu kun kiu oni korespondas dum longa tempo. Tre ofte oni estas pli amike letere ol voĉe. Mi konatiĝis kun ĉarma korespondantino antaŭ 2 jaroj. Mi amas ŝin letere & tute ne persone. Nun niaj rilatoj inter unu la alia estas tre malvarmaj. Konklude mi faros mian eblon por ne disrevigi vin. Tio estus tiel bedaŭrinda post nia tre agrabla korespondado.

Nun, tra tiu belega, hela, sunkuŝanta ĉielo kie flugas dolĉe hirundoj tute apud mia malfermata fenestro, mi sendas al vi tute amikan saluton nur bedaŭrante ke vi ne povas samtempe ĝin la mildecon de tiu trankvila vespero de somero.

La kamparo kiun mi vidas ĝis tre malproksime estas belega de tie.

Respektajn salutojn al via edzino

Sincere via

Alice Sergeant

Mi ne havas tempon relegi, do senkulpigu ĉiujn forgesaĵojn aŭ erarojn